Pluraj samideanoj el la grupo de Mulhouse kaj de Colmar akceptis defori dum unu aŭ du tagoj kaj helpi al S-ro Mas, kiu ne nur propagandis pri Esperanto sed ankaŭ pri la Tago de arbo. Ni devas aparte danki lin pro liaj instigo kaj sindonemo, sed ankaŭ S-ron Wermelinger, kiu gastigis lin kaj krome disponigis al ni multajn metodojn kaj kiel menciio pri siaj bongustaj kuketoj. Ni disdonis plurajn centojn da flugfolioj: *Metodo 4, pri la perkoresponda kurso, kaj aliajn, sed ankaŭ german-lingvajn por germanaj vizitantoj.* Ni vendis pli ol 50 verdajn libretojn "Une approche....", kolektis preskaŭ 70 adresojn per nia speciala enketilo. Ni multe diskutis, informis kaj propagandis pri Esperanto. Ni renkontis homojn scivolemajn, interesigantajn, entuziasmajn, sed ankaŭ skeptikajn, indiferentajn kaj eĉ kontraŭstarantajn pro nekompreneblaj konfuzaj kialoj. Do entute granda sukceso. Ni multe semis, ĉu la rikolto estos bona, fruktodona? Ĉiam estas malfacile taksii la rezultojn.

La demando estas nun kiel propagandi al la kolektitaj adresoj. Al la adresoj de la departemento 68, ni tre verŝajne sendos informojn pri nia septembra unu-taga staĝo en la kultur-domo Espace 110 en Illzach apud Mulhouse kaj pri niaj vesperaj kursoj en Illzach, Mulhouse kaj Colmar. Al respondeculoj en aliaj departementoj mi estas preta komuniki la concernajn adresojn aŭ eĉ sendi pretajn etiketojn, ĉar ĉiuj adresoj jam kuŝas en mia komputoro. Jen kiom da adresoj ni kolektis po departemento: 03: 1, 11: 1, 25: 3, 26: 1, 38: 2, 54: 1, 57: 2, 67: 15, 68: 32, 70: 1, 83: 1, 88: 5, 90: 1. Al plej multaj estus verŝajne oportune sendi informojn pri la staĝo en Thionville.

S-ro Mas disdonis plurajn milojn da flugfolioj pri la Tago de arbo, sur kiuj estas menciitaj kelkaj Esperanto-asocioj. Tio estas alia maniero konigi Esperanton. Ni ankaŭ elprofitu tiujn ideojn.

A. Grossmann

ALIĜILOJ POR
 LA INTERNACIAJ SEMAJNOJ



EN ALPOJ KAJ
 ĈE MEDITERANEO...

I4-A INTERNACIA SEMAJNO 1990.IX. 15. ĝis 22.

" LE LAZARET " SETE

Oni povas loĝi en la feriejo laŭ la prezoj :

I persono en unupersona ĉambro semajne 1.330 FF

I persono en dupersona ĉambro semajne 1.183 FF

La prezoj entenas la loĝadon kaj la tri manĝojn.

Adreson : Maison Familiale "Le Lazaret"
La Corniche 34200 SETE
Tel ; 67,53,22,47

Limdato de antaŭmendo de ĉambro ; 1990.VII.15

PROGRAMO -

Matene ; Diversnivelaĵoj kursoj

Posttagmeze ; Ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo

Vespere ; Amuzaj kaj kulturaj programoj.

EKSKURSOJ - eblaj sur loko

EKZAMENOJ - de la Franca Instituto de Esperanto estos organizitaj laŭ peto ,

La domo taŭgas al rulseĝuloj ,

- A T T E N T U -

Aliĝo al la dekkvara Esperanto Semajno valoras nur post pago de aliĝo, tio estas ;

270 FF

senpaga por junuloj malpli ol 26 jaroj,

Mendo de loĝado valoras ^{nur} post pago de antaŭmendo de

300 FF

Aliĝoj, informoj, klarigoj ;

ESPERANTO
5 rue du Docteur Roux
F 34000 MONTPELLIER
FRANCIO

14° SEMAINE INTERNATIONALE DU 15 AU 22.9. 1990

" LE LAZARET " SETE

On peut loger à la Maison Familiale dont le prix est le suivant:

I personne dans une chambre d'une personne, la semaine... 1.330FF

I personne dans une chambre de deux personnes, la semaine 1.183FF

Les prix comprennent la chambre et les trois repas .

Adresse : Maison Familiale "Le Lazaret"
La Corniche 34200 SETE
Tel : 67,53,22,47

Date limite d'inscription : 15.7.1990

PROGRAMME -

Matinée : Cours de plusieurs niveaux

Après-midi : excursions, cours, ou temps libre

Soirée : Programme culturel ou divertissements .

EXCURSIONS - nombreuses possibilités .

EXAMENS - de l'Institut Français d'Esperanto seront organisés sur demande .

La Maison convient aux fauteuils roulants .

- A T T E N T I O N -

L'adhésion à la 14° Semaine ne sera valable qu'après le paiement de la cotisation :

270 FF

gratuit pour les jeunes de moins de 26 ans .

Réservation du logement : valable après paiement d'une avance de

300 FF

Renseignements, réservations, informations ;

ESPERANTO
5 rue du Docteur Roux
F 34000 MONTPELLIER
FRANCIO

15 Pro la antaŭaj sukcesoj de similaj eventoj la KULTURA CENTRO de MONTPELLIER organizas 2 "INTERNACIAJN SEMAJNOJN" en tre allogaj lokoj de Francio.

= La 13a okazos en ripoza loko, kadre de agrabla familia domo en Alpoj, proksime de Svislando (30 km ĝis ĜENEVO)...

...de la 25a de aŭgusto ĝis la 1a de septembro.

= la 14a invitas vin trapasi agrablaj feriojn en ripoziga parko ĉe Mediteranea marbordo, en la Familia Domo "Le Lazaret", apud SETE...

...de la 15a de septembro ĝis la 22a de septembro.

Urĝas via enskribiĝo pere de la aliĝiloj apartaj en ĉi-tiu bulteno!

...sed vi ankaŭ povas feritempi en la tutmonda...

INSTITUTO INTERNACIA EDMOND PRIVAT
DE
KULTURA CENTRO ESPERANSTISTA
Pf 779, Strato Postiers 27
CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS (Svislando)

ĜENERALAJ SCIIGOJ

Programo de SEMAJNA ARANĜO

Lundo: alveno dum la mateno. 12h45: unua manĝo. 14h30-16h00 kaj 16h30-18h00: kurso. 18h30: manĝo. 20h00-21h30: konatiĝa vespero aŭ kurso.

Mardo: 8h00: matenmanĝo. 9h00-10h30 kaj 11h00-12h30: kurso. 12h45: manĝo. Libera posttagmezo. 18h30: manĝo. 20h00-21h30: preleg-vespero.

Merkredo: 8h00: matenmanĝo. 9h00-10h30 kaj 11h00-12h30: kurso. 12h45: manĝo. 15h00-17h00: promenado aŭ vizito de muzeo. 18h30: manĝo. Libera vespero.

Ĵaŭdo: 8h00: matenmanĝo. 9h00-11h00: kurso. 11h00: piedira aŭ perveturila migrado laŭ la konsisto de la grupoj kaj veteraj cirkonstancoj. 13h00: pikniko en la naturo aŭ en kafejo. 19h00: loka festa manĝo: forduo, rakiedo aŭ alia specialaĵo. 20h30-23h00: amika vespero.

Vendredo: 8h00: matenmanĝo. 9h00-10h30 kaj 11h00-12h00: kurso. 12h00-12h30: konkludo de la kurso. 12h45: manĝo. Libera posttagmezo. 18h30: manĝo. 20h00-21h30: babila aŭ prelega adiaŭa vespero.

Sabato: 8h00-9h00: matenmanĝo (lasta manĝo). Forveturo aŭ plilongigo de la restado.

Prezoj: Tuta aranĝo (kurso, manĝoj, tranoktado, organizitaj promenadoj, vespero, ktp.) kostas kun tranokto en kvarlita ĉambro: SF 400.-, en dulita ĉambro: SF 440.-, en unulita ĉambro: SF 520.-. Tiuj prezoj validas, se la antaŭpago alvenis unu monaton antaŭ la komenco de la koncerna aranĝo. Se la antaŭpago alvenas poste, sed almenaŭ dek tagojn antaŭ la aranĝo, aldoniĝos SF 20.- al la restadkosto. Se la antaŭpago alvenas dum la 10 lastaj tagoj antaŭ la aranĝo, aldoniĝos SF 50.- al la restadkosto. Du, aliĝu kaj konfirmu vian aliĝon kiel eble plej frue!

Prez-reduktoj: Familia partopreno: unua familiano pagas plenan prezon, rabato 10% por la aliaj familianoj. Organizitaj grupoj (almenaŭ 5 personoj): rabato 10%. Aldona redukto por infanoj, lernantoj aŭ studentoj: po SF 35.-.

2-7 julio: LAJOS TARKONY KAJ LA BUDAPEŝTA SKOLO. Instruos Istvan ERTL, hungaro, beletristo, verkisto kaj tradukisto. Parnasismo kaj estetismo en la Tarkony-a verko. La evoluo de la esperanta poezia stilo. La neologisma problemaro. Kontribuo de Tarkony al Literatura Mondo, La Nica Revuo, Hungara Vivo; la rolo de ĉi tiuj revuoj en la esperanta literatur-historio. Plurlingva verkado (Tarkony ankaŭ verkis itale kaj hungare) kaj memtradukado. Recenzado kaj literatura kritiko en esperantujo. Elfrancaj kaj aliaj tradukoj de Tarkony. Noto: Kiuj posedas la verkojn "Soif" de Tarkony kaj "Tarkony kaj la Budapeŝta skolo" de Ertl, tiuj kunportu ilin. Il estos aĉeteblaj.

2-7 julio: ESPERANTO-STAĜO (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj).

9-14 julio: IERTIĜO EN LA TRADUKARTO KUN TRADUKISTO. Instruos Tomasz CHMIELIK, polo, instruisto, redaktoro kaj tradukisto el pluraj lingvoj al esperanto. Li ekzemple esperantigis la plenan verkaron de Dürrenmatt kaj multajn verkojn de Günter Grass, Samuel Beckett, Isaac Bse-Singer, Joseph Heller, Miĥail Bulĥakov, Boleslav Prus, Bruno Schulz, Anna Swirszczynska, ktp. Multaj alfrontas traduk-problemojn, estas nuntempe tradukantaj aŭ tradukontaj prospektoj, beletrafori; fakan verkon. Sen okupiĝi pri la fideleco al la devena lingvo, la kurso celos diskuti la rezulton: ĉu la submetitaj tradukaĵoj indas je esperanto vortare, stile, aŭ ĉu en ili tro respiguliĝas nacilingvismoj kaj idiotismoj. La instruado atentigos pri teoriaj aspektoj de la tradukarto, pri stilistikaj problemoj propraj al la esperanto-literaturo kaj pri transformaj ebloj riĉigantaj la esprimmanierojn. La kursanoj intensive ekzerciĝos en la arto traduki kaj juĝi tradukojn. Kritikoj kaj diskutoj progresigos ĉiujn.

9-14 julio: ESPERANTO-STAĜO (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj).

16-21 julio: KIEL FORMIĜIS LA INTERNA IDEO DE ESPERANTISTOJ. Instruos Tomasz CHMIELIK. Indas trastudi tion, kio estas ligilo por ĉiuj esperantistoj. Indas esplori la judecon de Zamenhof kaj ties cionistan agadon, sen kiu oni ne povas kompreni hilelison kaj homaranismon. Ne malpli interesa estas la sekvo: interpopola konduto de Edmond Privat, la konceptoj de Hodler, Lanti kaj Lapenna, kiujn oni trastudos pere de tekstoj de ili mem. Oni montros la provojn adapti esperanton en tiaj movadoj kiel: bahahismo, kvakerismo kaj Oomoto. Dum la kurso prezentiĝos video-filmoj pri Oomoto kaj interesegaj lumbildoj, kiuj dokumentas la vivon de la pola judaro, ties strebojn por propra identeco en la Lempo, kiam estiĝis esperanto kaj kiam Zamenhof luktis por sia idearo.

16-21 julio: ESPERANTO-FERIADO POR INFANOJ KAJ FAMILIOJ. Unua semajno. La celo de tiu aranĝo estas doni al familioj kaj geknaboj la eblon ek-, plu- kaj el-lerni esperanton kaj praktiki tiun ĉi lingvon en vivo-plenaj situacioj: ludoj, kantoj, manlaboroj, promenadoj, sportaj okupoj. Formiĝos grupoj laŭ la lingvaj kapabloj kaj laŭ la aĝoj, ke ĉiuj sentu sin en entuziasmiga etoso. La infanoj ĝis la 12-jaraĝo estu kun plenkreskulaĵoj akompanantoj. Favoraj prezoj: SF 250.- Ambaŭ semajnoj kun la semajnfino: SF 500.- Petu la detalan informilon.

16-21 julio: ESPERANTO-STAĜO.

16-23 julio: (en Le Louvain) KELI-Kongreso. Petu la detalan informilon al s-ino Marie-Louise MÜNGER, strato Collège 14, CH-2114 FLEURIER (Svislando).

23-28 julio: LA RECENZO-ARTO EN ESPERANTO. Instruos E. BORSBOOM, nederlandano, instruisto de lingvo kaj literaturo en supera lernejo, metodologo kaj verkisto. En ĉiuj esperantaj gazetoj aperas recenzoj pri libroj. Unuj bonaj, aliaj malbonaj. Kiel legi ilin? La kurso pritraktos ĉiujn flankojn de la recenzo-arto. Ni rerigardos al specimenoj de la antaŭaj jardekoj, komparos diversajn kritikoj pri samaj libroj, fiksis normojn kaj konatiĝos kun la hodiaŭaj recenzo-gazetoj Esperanto, Literatura Foiro, Hungara Vivo, Dialogo, ktp. kaj kun valoraj recenzantoj. Krome okazos kelkaj ekzercoj pri recenzado.

23-28 julio: LA RELIGIA EVOLUO DE EDMOND PRIVAT AL HOMARANA KVAKERISMO estos la temo de la eksterkursaj prelegoj de la koncerna semajno. Ĉiuvespere tiuj prelegoj disvolviĝos de la 20h00 ĝis la 21h00 kun posta diskuto kaj interŝanĝo de vidpunktoj de la 21h00 ĝis la 21h45. Marde kaj vendrede ili okazos ankaŭ posttagmeze de la 16h00 ĝis la 18h00. Prelegontoj jam anoncitaj: Claude GACOND, Marie-Louise MÜNGER, Giorgio SILFER. Temoj priraktotaj: La religiaj influoj; la protestanta pietismo en Genevo sine de la 19-a jarcento, La ekumenismo de la teologo kaj filozofa Ernest NAVILLE, la bahaismo de Auguste FORCI, Paul PÉTAVLI kaj liaj "Dimanĉaj Foliĝoj", la Konferenco de Sainte-Croix, la homaranismo de L. ZAMENHOF, la sinkretismo de Mahatma GANDHI. Rezulto: la kvakerismo aŭ homaranismo de Edmond PRIVAT. Por la partoprenantoj al la kursoj de la koncerna semajno tiuj prelegoj estos senpagaĵaj. Por la feriantoj nesekventaj kurson la kotizo estos ĉu SF 60.- por la tuta prelegaro aŭ po SF 10.- por preleg-vespero aŭ preleg-postagmezo.

23-28 julio: ESPERANTO-FERIADO POR INFANOJ KAJ FAMILIOJ. Dua semajno. Eblas aliĝi al ambaŭ semajnoj aŭ nur al unu el ili.

23-28 julio: ESPERANTO-STAĜO.

30 julio - 4 aŭgusto: LA SVISGERMANA LITERATURO - ĜIAJ TENDENCOJ KAJ REPRESENTANTOJ. Instruos Tomasz CHMIELIK, pola, instruisto, tradukisto kaj redaktoro, germanisto. La kurso celas prezenti ĉiujn tendencojn de la svis-germana literaturo post 1945. Estos la okazo ne nur sekvi la prelegaron, sed ankaŭ aktivigi en la diskutrondo, priparolante verkojn de la svisgermanaj aŭtoroj en esperanto-traduko. La kurso provos konigi atingiĝojn de la svisa kulturo ligo kun la alproksimiĝanta 700-jariĝo de la Svisa Federacio.

30 julio - 4 aŭgusto: INTENSIVA PEDAGOGIA-METODIKA KURSO PRI LA ESPERANTO-INSTRUADO PERBILDA. Instruos Claude GACOND, sviso, direktoro de KCE. Intimiĝo kun la diversaj artoj uzi bildojn por paroliĝi esperanto-lernantojn: flanelbildojn, afiŝelementojn, ludkartojn, lumbildojn, filmojn eĉ, ktp. Adekvata instru-programo. Posttagmezaj taskoj: Pretigo de paroliĝaj ekzercoj diversnivelaĵaj kaj de instru-helpiloj.

30 julio - 4 aŭgusto: ESPERANTO-STAĜO.

06-18 aŭgusto (Dusemajna kurso): 3-A INTENSIVA PEDAGOGIA-METODIKA KURSO organizita de OEA-ILEI kun KCE. Celo: Rajtigo al esperanto-kursgvidado laŭ la internacia unuigita programo de UEA-ILEI. La kurso okazos laŭ la instruprograme de UEA-ILEI. La studado intensiva finiĝos la unuan semajnon per skriba ekzameno kaj la duan semajnon per praktikaj kaj teoriaj ekzamenoj kaj per ricevo de atestilo de UEA-ILEI rajtiganta gvidi internaciajn esperanto-kursojn. La kurson rajtas partopreni personoj, kiuj bone konas esperanton kaj posedas almenaŭ mezan klerecon. ILEI komisiis la didaktikan defgvadon de la kurso al magistrino Irena SZANSER, polino, metodologo pri fremdlingvo-instruado, kunlaboranto de la fremdlingva fako ĉe Varsovia Instituto por Klerigo de Instruistoj, kaj membro de la Eduka kaj Ekzamena Komisiono de ILEI, aŭtoro de "Ĝlotolidaktikaj kaj specifaj aspektoj de esperanto-instruado" kaj "Elektitaj problemoj de psikologio por lingvo-instruisto", fundamentoj de la kurso aĉetebaj ĉe KCE: SF 27.- aŭ perkoresponde. Petu la detalan informilon kun la horaro, prezoj kaj kun pliaj sciigoj.

6-11 aŭgusto: LA MUZIKA KULTURO EN ESPERANTO. Instruos Nicole PAIROUX, belgino, ekslernejestro, kantistino konata sub la nomo Nikolin'. Esperanto estas interesa kaj unika kulturlingvo ankaŭ pro siaj kantistoj kaj kanzonoj. Precipe ekde la sepdekaj jaroj, sed ankaŭ pli frue, muziko fariĝis grava dimensio de nia transnacia kulturo. Nikolin', profesia kantistino el Belgio, akompanos vin en agrabla promenado tra tiu dimensio, ekde la unuaj versoj de La Espero, tra la kabareda talento de Raymond Schwartz kaj Mihaly Sárosi, ĝis la "roma skolo" de Gianfranco Molle kaj la rok-ensembloj de la 80-aj jaroj. Ĉiutage finposttagmeze sub la gvidado de Nikolin' grupiĝos la kantemuloj el la diversaj kursoj por formi korusecon kaj por pretigi unu aŭ du kant-koncertojn vesperajn.

6-11 aŭgusto: ESPERANTO-STAĜO.

13-18 aŭgusto: ESPERANTO-STAĜO.

20-25 aŭgusto: REDAKTADO DE ESPERANTO-PERIODAĴOJ. Instruos Perla MARTINELLI, ĉefredaktorino de Literatura Foiro, arta direktoro de LF-Koop. Vi ĵus akceptis prizorgi la redaktadon de via kluba bulleto, aŭ eĉ de landa organo. Aŭ vi faras tion jam de kelka tempo. Aŭ vi ambicias al posteno de pli grava internacia gazeto. En ĉiu kazo la realo aspektas pli malfacila, eĉ timiga: ne nur la redaktado, sed ankaŭ la grafiko falis sur viajn ŝultrojn, kaj sen financaj rimedoj, krom la minimumo. Kiel elturniĝi? Kiel plibonigi la kvaliton en have kaj teknike, ene de ĉi tiuj drastaj limigoj? Perla Martinelli ne posedas magiajn formulojn, sed la plej grandan sperton en la fako. Post partopreno en ŝia kurso vi malkovros ke, por iom da raciigo kaj fantazio, eblas ankaŭ al vi pli bone, kvankam senmone, viviĝi periodaĵon.

20-25 aŭgusto: SINJORO TADEO, ĈEFVERKO DE LA POLA KAJ DE LA ESPERANTA POEZIOJ. Instruos Giorgio SILFER, doktoro pri beletristiko kaj pri modernaj lingvoj, verkisto, prezidanto de LF-Koop. "Patro de la esperanto-poezio": tiel oni kromnomis Antonon Grabowski. Li estis la unua "majstro de l' traduka ĝenro", kaj liaj verkoj markis rutan epokon. Same kiel Petrarca kaj Boccaccio al la itala, Grabowski kaj Kabe influis al la esperanta literaturo lingvo, poezie respektive proze; kaj se en "La Faraono" ni rekonas (funkcie) nian dekametonon, des pli grave kaj evidente trovi en "Sinjoro Tadeo" nian Canzoniere. La traduko de Grabowski peris al nia komunumo la kvintesencon de la pola kulturo: ĝi estas fundamenta verko por aliri kaj la polan kaj la esperantan mondon. Note: Necesas kunporti la libron "Sinjoro Tadeo" aŭ aĉeti ĝin ĉe KCE.

20-25 aŭgusto: ESPERANTO-STAĜO (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj.)

25-26 aŭgusto: STUDA SEMAJNFINO: KONKLUDO AL LA CENTJARA JUBILEO DE EDMOND PRIVAT.

27 aŭgusto - 1 septembro: ESPERANTO-STAĜO (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj.)

15-17 septembro: MIGRADA PLILONGIGITA SEMAJNFINO. Detala programo anoncita. Gvidos ĝin Claude GACOND.

24-29 septembro: ESPERANTO-STAĜO.

29-30 septembro: STUDA SEMAJNFINO.

8-13 oktobro: KRISTANA KULTUR-SEMAJNO ESPERANTISTA. Travivo de agrabla semajno kun amikoj en kristana rondo. Gvidos ĝin pastro Bernhard EICHKORN, germano, kaj diakonino Marilu MÜNGER, svisino. Programeroj: Kantado kun pastoro Adolf BURKHARDT, germano, en praktiko kaj teorio. Multaj novaj religiaj kantoj el la tuta mondo estas tradukitaj de li. Ekskursoj al eklezie rimarkindaj ejoj. Bibliaj demandoj, bibliaj rondoj. Komputila laboro en servo de Kristana Fakovtaro. Kristanaj eldonoj, Aktualaj informoj. Variaj diservoj. Konstruo de la meditejo Max Josef Metzger ktp. Studentoj ĝis 25 jaroj ĝuos forte reduktitajn prezojn.

22-27 oktobro: ESPERANTO-STAĜO.

27-28 oktobro: STUDA SEMAJNFINO.

19-24 novembro: ESPERANTO-STAĜO.

24-25 novembro: STUDA SEMAJNFINO.

17-22 decembro: ESPERANTO-STAĜO (se alvenos almenaŭ 5 aliĝoj.)

17 SARLANDA ESPERANTO-LIGO (SEL)

=====

36A KULTURA SEMAJNFINO
7/9AJN DE DECEMBRO 1990

1990-12-07 vendredo - Freitag

- 17.00 alveno - Anreise
17.00 - 18.00 lingvaj ekzercoj
Sprachliche Übungen
18.30 vespermanĝo - Abendessen
poste/danach konversacia vespero
Konversationsabend

1990-12-08 sabato - Samstag

8.30 - 9.00 matenmanĝo - Frühstück
9.00 - 10.00 laborkunsido
Arbeitssitzung
10.00 - 12.00 ekskurso - Ausflug
12.30 - 14.00 tagmanĝo - Mittagessen
ĝis/bis 14.00 alveno de ĉiuj partoprenantoj
Anreise aller Teilnehmer
14.30 - 16.00 la kaj 2a lecionoj: A, B₁, B₂, C
1. und 2. Kursstunde: A, B₁, B₂, C
16.00 - 16.30 posttagmeza kafo
Nachmittagskaffee
16.30 - 18.00 3a kaj 4a lecionoj: A, B₁, B₂, C
3. u. 4. Kursstunde: A, B₁, B₂, C
18.30 - 19.15 vespermanĝo - Abendessen
19.30 - 20.15 diservo - Gottesdienst
poste/danach muzika vespero - grupo "Kajto"
Musikabend

1990-12-09 dimanĉo - Sonntag

8.00 - 9.00 matenmanĝo - Frühstück
9.00 - 10.30 5a kaj 6a lecionoj: A, B₁, B₂, C
5. u. 6. Kursstunde: A, B₁, B₂, C
10.30 - 11.00 pauzo - Pause
11.00 - 12.00 7a leciono: A, B₁, B₂, C
7. Kursstunde: A, B₁, B₂, C
12.00 - 12.30 aperitivo - Aperitiv
12.30 - 14.00 tagmanĝo - Mittagessen
poste/danach forveturo - Abreise

"Kardinal-Wendel-Haus"
HOMBURG/Saar

PRIATENTU! Adreso de la stagejo:



- A. Por komencantoj: Enkonduka kurso
Lernolibro: W. Wingen: Wir lernen Esperanto
Kursestro: Karl Burger, Otzweiler (D)
- B. 1 Por progresantoj: Parolaj kaj legaj
ekzercoj por profundigi la lingvajn konojn.
Legolibro: Schwartz: Vole... Novele
Kursestro: Krešimir Barkoviĉ, Paris (F)
- B. 2 Por lingvaj spertuloj: Stilistikaj kaj
literaturaj ekzercoj.
Legolibro: Schwartz: Kun siaspeca spico
Kursestro: Hermann Behrmann, Paderborn (D)
- C. Por esperanto-parolantoj okazos seminario
Temo: Japanio kiel mezono inter okcidento
kaj oriento
Preleganto: Yosimi Umeda (J)

Liber-tempa programo:

- muzika vespero i. a. "kajto"
- konversacia vespero
- vizitoj
- diservo

Pri aparta porinfana programo zorgos Takajo Walz,
Zweibrücken (D)

Oni tranoktos en unu- kaj tri-litaj ĉambroj.
Plena pensio kostos 50,- DM por unu tago.

La ĉi-kunan aliĝilon bv. resendi ĝis la
unua de decembro 1990. La aliĝ-kotizon
(25,- DM; SEL-membroj: 15,- DM).
bv. pagi al nia pĉk Saarbrücken 5358-663

gejunuloj 26-jaraj kaj malpli same kiel
gestudentoj ne pagas aliĝkotizon.

Vi atingos nin:

trajne: linio Saarbrücken-Ludwigshafen. De la staci-
domo per fervoja buso al direkto Zweibrücken (haltejo
Birkensiedlung), poste kelkminuta pied-iro.

aute: Autoŝoseo Saarbrücken-Mannheim, eliro Hom-
burg, poste strato B 423 al direkto Zweibrücken
Atentu pri voj-montriloj.

BONVOLU RESENDI LA ĈI-SUBAN ALIĜILON
AL

SARLÄNDISCHER ESPERANTO-BUND E. V.

QUERSTRASSE 11

D - 6607 QUIERSCHIED

zur 36. Esperanto-Fortbildungstagung por la 36a Kultura Semajnfino Homburg/
Saar, Kardinal-Wendel-Haus, 1990-12-7 = 1990-12-9

1 Ich nehme teil am Kurs. Mi partoprenas kurson A R1 R2 C
2 Ich möchte im Haus übernachten und frühstücken. o
Mi volas tranokti kaj matenmanĝi en la domo o
3 Ich nehme an folgenden Mahlzeiten teil. Mi partoprenos jenajn manĝojn
o Abendessen Freitag vespermanĝo vendredo 1990/12/7
o Mittagessen Samstag tagmanĝo sabato 1990 /12/8
o Abendessen Samstag vespermanĝo sabato 1990 /12/8
o Mittagessen Sonntag tagmanĝo dimanĉo 1990/12/9
4 Ich bestelle folgende Bücher. Mi mendas la jenajn librojn
A Ex /ekz Wingen: Wir lernen Esperanto. (18, DM)
B 1 Ex /ekz Schwartz: Vole... Novele (24, DM)
B 2 Ex /ekz Schwartz: Kun siaspeca spico. (27, DM)

5 La aliĝkotizon de 25, DM (membroj: 15, DM) mi pagas samtempe o
sen aliĝkotizo o

Hain: Subskribin
Validan bv. krii i X

ANMELDUNG ALIĜILO

MIA ADRESO:



Jam de pluraj jaroj la Franca Esperanto-Instituto esploras la problemon de la ekzamenoj, kiuj ne multe ŝanĝiĝis de post ilia starigo en 1921, kvankam ŝanĝiĝis la instruometodoj kaj la postuloj por la ekzamenoj pri ĉiuj aliaj lingvoj. Por ke la ne-esperantistoj taksu Esperanton serioza, necesas, ke la esperantistoj taksu ĝin grava ne nur en siaj paroloj. Montrigi do necese rekonsideri la tutan ekzamsistemon por montri, ke niaj diplomoj estas vere fidindaj, kaj por pruvi, ke la diplomitoj rajtas fidi la ekzamenantojn kaj la Ekzamen-Komisionon de FEI; ili estu certaj, ke iliaj konoj kapabligas ilin senprobleme ĉeesti pli superan kurson kaj provi pli altan ekzamenon.

La nuna formo de la Elementa Ekzameno, kiu validos ek de la 1-a de septembro 1990, plenumas tiujn postulojn. Venontjare la Instituto konsideros la 2an nivelan, eble la 3an nivelan, ekzamenon. Ek de nun la kursgvidantoj devus kalkuli pri tiuj ŝanĝoj kaj postuloj.

Pierre Babin, prezidanto de FEI,

NOVAJ EKZAMENREGULOJ

UNUAGRADA NIVelo (ELEMENTA) surbaze de listo de 400 radikoj¹

| Skriba parto (daŭro: unu horo) | poentoj |
|--|---------|
| - kvin demandoj pri deklinia facila teksto | 20 |
| - Tru-ekzerco (10 kompletigoj) | 10 |
| - Plurrespondaj demandoj (5 proponoj) | 10 |
| - Diktaĵo | 10 |

Parola parto (daŭro: unu horo)

| | |
|---|----|
| - Laŭvorta legado de anekdoto elektita de la ekzamenanto | 10 |
| - Respondi demandojn pri la kompreno kaj la gramatiko de tiu ĉi teksto (10 por la kompreno + 10 por la gramatiko) | 20 |
| - Komentoj bildon | 10 |
| - Ekstemporala legado de 5 nombroj aŭ datoj | 10 |

NB Gramatikaj klarigoj en la franca lingvo se la kandidato preferas.

Por sukcesi la kandidato ricevu entute (skribe kaj parole) almenaŭ mezan noton (t.e. 50 poentojn el 100).

Notoj:

- Listo de tiuj 400 radikoj estas nun studata kaj baldaŭ publikigota.
- Plurrespondaj demandoj, france QCM (*questions à choix multiple*) celas kontroli ĉu la kandidato konas la gramatikon. Jen ekzemplo: por kontroli la uzon de refleksivoj:

La infanoj lernas ... lecionojn.

1. liajn 2. ŝiajn 3. iliajn 4. siajn

La kandidato devas elekti la nuran solvon eblan por ke la frazo estu gramatike korekta, kaj ĉirkaŭigi la numeron de la solvo: 4. siajn.

EKZAMENTASKOJ

La taskoj de la ekzamenoj, post sufiĉe frua peto fare de la organizantoj de ekzamsesio, estos sendataj de François Lo Jacomo, nova direktoro de la ekzamenoj.

Ĉiuj membroj de FEI kaj eĉ Esperanto-instruistoj ekster FEI estas petataj elpensi tiajn tekstojn kaj sendi al F. Lo Jacomo stokon da uzebla materialo.

Tamen oni bone atentu: neniu rajtas proponi por la skriba parto de ekzamsesio tekstojn, kiujn li mem verkis. Nur validas tekstoj senditaj de la direktoro de la centro. *FEI rajtas malvalidigi diplomojn, se la tekstoj uzataj por la ekzameno ne venas de FEI.*

(Protokolo de ia lasta kunveno.) Post ia ekzameno, ĉiuj taskoj estu senditaj al F. Lo Jacomo.

VERKOJ STUDOTAJ por kapableco kaj pedagogia atesto

Kelkaj verkoj estas jam malnovaj, aliaj elĉerpiĝis: tial la programo grave ŝanĝiĝas:

Faktoj kaj Fantazioj (Marjorie Boulton)

Ombro sur interna pejzaĝo (Spomenka Ŝtimec)

Beletro sed ne el katedro (Gaston Waringhien)

La blinda birdo (Istvan Nemere)

ADMINISTRADO DE FEI:

Membroj: Pierre Babin, Roger Bernard, Jean-Pierre Danvy, Hervé Gonin, Raymond Gonin, Georges Lagrange, Jacques Le Puil, Roland Levreaud, François Lo Jacomo, Daniel Moirand, Claude Roux, Jean Selle, Marcel Ternant, Renée Triolle, Jeannine Vincent.

Ekzamena komisiono: Ĝi konsistas el: Roger Bernard, Georges Lagrange, Roland Levreaud, Jeannine Vincent.

Direktoro de la Centro: François Lo Jacomo (ek de la 1.10.1989), 21 rue Juliette Dodu, 75010 Paris.

Estraro: Prezidanto: Pierre Babin; Vicprezidanto: Georges Lagrange; Sekretario: Jean-Pierre Danvy; Kasisto: Jeannine Vincent.



el nia leterkesto...

*Mesaĝo al eta princo...*

Mi scias, ke legante ĉi-tiujn liniojn, vi pensas, ke mi estas aŭdaca. Fakte, mi ĵus volis esprimi tion, kion mi interne kaj profunde sentas. De post unu jaro mi konas vin, mi amas vian nomon, mi amas vian tutan personon, mi tute simple amas vin... Ni havis mirindan tempon kune, kaj dum kelkaj monatoj mi eĉ pensis, ke Esperanto povus esti edzperanto... sed bedaŭrinde ni ĉesis iri mano en la mano!

Mi neniam intencis ŝteli vian liberecon, kaj mi estas certa, ke niaj malfacilaĵoj ne estis neverkeblaj...

Tu skribis, ke "la amo al la alia estas la respekto de la libereco".

Mi vere aprobas tiun aserton kaj neniam mi provis "suĝoki" vin...

Vi estis libera... Vi estas libera...

iu karulino



Denove pri la 34a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo...

"Tiu KS^o estis la unua renkontiĝo, kiun ni partoprenis post nia alveno en Eŭropon. Ni ĝuis tie agrablan etoson de amikeco. Rimarkinda estis la distra vespero, la loĝejo kaj la manĝado, ĉiuj tre bone aranĝitaj.

Ni havis ankaŭ la oportunon profiti kelkajn studhorojn ĉe Hermano Bermano. Malgraŭ la mallonga tempo, misukcesis lerni multajn gramatikerojn laŭ la "Analiza Skolo", pri kiu Prof. Bermano estas spertulo. La unuan fojon mi aŭdis paroli pri Ricardo Ŝulco kaj Ludoviko Mimoo. Ŝajnis al mi tre interesa la "An. Skolo" kaj mi tuj komencis studi per ĝi.

Aliflanke, mi opinias nekonsilinde dum kursoj transdoni al la lernantoj ideojn pri kvereloj kaj politikaj malakordoj ene de la esperantista Movado. Tio estas iomete konfuziga por la novuloj, kiuj ankoraŭ ne ellernis la lingvon".

Eduardo da Costa



Post la apero de la fabelo "La ronkanta avo", eldonita de la Orientfranca E^o-Federacio (relegu ĉi-supre trafan recenzon!) iu "asocio" publikigis protestan leteron; informanto, pri kies nomo ni silentos, havigis ĝin al ni kaj vi malkovros ĝin ĉi-sube tradukitan al Esperanto:

FEDERACIO DE LA FRANCAJ SOVINISTOJ EN ALZACO *

" La germana danĝero estas pli aktuala ol iam: iu Edmond LUDWIG tradukis al Esperanto **La ronkanta avo**, novelon de la fama por-germana aŭtoro André WECKMANN, perfida Alzacano, kies infanoj parolas nur la germanan. En la tradukaĵo vi konstatos, ke nia kara provinco perdis sian nomon "Alzaco", tiel klaran, tiel sonoratan, por fariĝi "Elzaco"! Cu tiu "e" estas eltenebla? ĝi ŝajnas enhavi la tutan pezecon de la germana pedantismo. Ni devas reagi plej rapide, tial ni insiste petegas, ke ĉiu bona Franco mendu tuj almenaŭ unu ekzempleron de tiu libraĉo ĉe la libro-servo de la Federacio, por detruji ĝin ĵus ricevita. Sendu tuj 25 F-ojn (plus 5 F-ojn por la sendokosto) al:

Roger DEGRELLE
Esperanto-Libroservo
12, rue Estienne d'Orves
54490 PIENNES

* Ni vane klopodis por malkovri la statutojn de tiu "Federacio" en la Prefektejo de Strasburgo.

Antaŭan dankon! "

KOMENTO DE LA LIBRO-SERVO

"Ni efektive ricevis pli da mendoj ol kutime por la libro de André WECKMANN, **La ronkanta avo**; ĉar multe el ili estos detruitaj, oni povas opinii, ke tiuj, kiuj restos, fariĝos valoraj raraĵoj. Ni do tre konsilas al la inteligentaj Esperantistoj sendi tuj 25 F-ojn (plus 5 F-ojn por la sendokosto) al:

Roger DEGRELLE
Esperanto-Libroservo
12, rue Estienne d'Orves
54490 PIENNES

Antaŭan gratulon!



PAPARO PROSPERAS...

"Kiu asertas, ke nia "movado"(?) stagnas aŭ lamas? Nu, mi klare diferencigu la terenojn: fakte la tutmonda "esperanta" popolo (ĝi daŭre "esperas" spite ĉion!), kiel maro sub influoj de la luno, havas siajn proprajn tajdojn, iafoje basaj, iafoje altaj... Miloj da esperanto-lernantoj ie naskiĝas miloj esperanto-lernintoj aliloke malaperas. Kiom da ni estas? Jen "tikla kaj paradoksa" demando!

Sed ni vidu: sur la supra podio svarmas "papo", kies nomoj brilas ĉe l'firmamento de l'eminentularo kaj kiuj kulpas multfacetajn pap-agojn! Ĉar ili ne kontentiĝas kunsidi kaj silente deĵori! Male, paralele al abunda, daŭra "ovumado" en revuoj, bultenoj aŭ oficialaj presaĵoj ili ĝoje petolas, ek-krias, kverelas, eĉ ebriiĝe interbatalas... Stranga paparo! Ĉiu el ili pretendas meriti la cidaron aŭ la tiaron de la Esperanto-Ortodokseco!

Jes, svarmas la "SKOLOJ"... Honto al ĉiu el ni, kiu ne enskoliĝas! Post la malapero de Lejzero - la granda, netuŝebla, poreterne surpiedestiligita majstro - surpodiumiĝis nekalkulebla nombro da apostoloj, kiuj senbride kaj plej gajsintene interpretas siamaniere la "Malnovan E°-Testamenton" kaj proponas sian "Novan..."! Sed vi estu singarda: iun ajn vi elektos, oni traktos vin stultulo! Dependas de la papo, sub kies tiaro vi ŝafumiĝas. Govo, Kalo, Bago... Budapeŝta Skolo... vi konas!... Nur fuŝuloj, se ne fiuloj! Unu el ili naskis monstraĵon -Poagro-, verkaĵo apud kiu la "Satanaj Versegoj" aspektas kiel kat-pisumaĵo. Nepre sekvenda konsilo: neniam pilgrimu al la "Litomiŝla Tombejo": valoras nur alia piĉaĵo! Male, nutru vin ĉe la mamoj de la "Bona Lingvo" kaj ne plu eraru frandante pomon! Eble la "Iltisa Skolo" pli najbaras al vi... Ĉu Rohon oni ne laŭdis -eĉ poeme!- dum neforgesebla staĝo en Homburgo? Bedaŭrinda fuŝaĵo! Vi ascendis tro alten... malsupreniru! Eble eliksiron vi aprezus dum Ŝulco-suĉo: blinda bubaĉo... ĉu vi ne priatentis lian agon? Jen tute neatendita kriterio, kies gravecon vi ne sufiĉe taksis! Jes ja, ju pli vi maljuniĝas, des pli vi stultiĝas sed tio ne estas apanaĝo de la esperanta medio... Jen papa voĉo el Mezeŭropo: ili pli aŭdebliĝas de kelke da tempo ĉu ne? Vi do decidus konatiĝi kun freŝstampita guldeno -tajperaro!... goldeno!- Lasu tion flanke, ĉar la homo ne suferas, ke "kulo feble furzu" sub lia nazo... Restos al vi forlasi tiun mon-eron por ĉui la mon-emon sub la sceptro de ĵus (?) aperinta nova papo, kies nomon vi plej facile memoros: Ĵofo Dologo. Laŭ li, Govo kaj Ŝulco absolute nenion komprenis: ni forbrulu la PAG-on!

Sed ege nemalhavebla bonŝanco por ni: niaj Akademianoj firme ŝirmas la Fundamentan Testamenton! Jen tute trankvila "areopago"... Eraro: ĉu vi ne legis pri polemiko ĉirkaŭ la landnomoj? Kara Koreo kore aprezis!

Iĝu do filozofema kaj tute simple daŭrigu vian instruon de la lingvo "simpla, logika, kun nur 16 reguloj"... Povrulo! Vi dronas en kaĉo de pluraj jardekoj: Esperanto estas ja nek simpla, nek logika! Kial do vi havis bizaran ideon: ĉeesti staĝon en Merkwiller? Dum tre longa periodo vi fabrikis handikapitajn esperanto-parolantojn: imagu, ke kelkaj intencus trapasi la "Kapableco-n" (estas daŭre asertate, ke nur "Kapableculoj"... kapablas "ortodokse" instrui Esperanton), ili kvazaŭ svenos pe-nante malĉifri esoteran terminologion kuŝantan en la Gvidlibro de FEL, ĉar vi neniam menciis tiujn monemarojn al ili: predikativo, absoluta verbo, adjekta infinitivo, absoluta participo...

Mi tuj lernos la anglan lingvon... Mi ja volas elerarigi "Majoron Thomson", kiu iam asertis: "ESPERANTO? Ridiculous!! It's much too easy!"



Kandido

Letero ĵus ricevita el Moskvo:

"Mi legis kun plezuro vian "La Inĝormilo-n", kiu tre plaĉas al mi. Mi tre volus abonigi, bedaŭrinde mi loĝas en nepagipova lando. Ĉu vi konsentus sendi ĝin al mi senpage? Kompense, se vi venos iam en Moskvon, mi gastigos vin kun plezuro kaj admirigos al vi mian glasnostan* noktoĉemizon..."

Valentina Karesemulina

* noto de la redaktoro: oni scias, ke "glasnost" signifas "travidebleco".

Respondo de la Prezidanto:

"Via propono estas ŝia kaj mi ne povas konsenti ĝin. Turnu vin al "La Kancerkliniko", kiu estas pli taŭga pri tiaj aferoj!"

P.S. = kiam oni sendas al mi tian leteron, oni adresu ĝin al mia laboradreso kaj ne al mia privata adreso, kie mia edzino povus legi ĝin. Dankon! "

CONSEILS AUX DEBUTANTS

Certains débutants s'imaginent parfois que l'espéranto n'est pas capable de rendre toutes les nuances du français; pratiquant l'un et l'autre de longue date je puis affirmer le contraire; seulement il est exact que les moyens ne sont pas les mêmes. Je prends un exemple caractéristique: considérons les deux phrases: *Les élèves qui n'ont pas travaillé seront punis* et *Les élèves, qui n'ont pas travaillé, seront punis*. Dans le premier cas ne seront punis que les élèves qui n'ont pas travaillé, dans le deuxième tous les élèves le seront parce qu'ils n'ont pas travaillé. Or, dans un souci de clarté, la ponctuation traditionnelle de l'espéranto demande de placer entre virgules les subordonnées, à l'imitation de l'allemand. Ainsi donc un débutant pensera-t-il que les deux phrases françaises, au sens pourtant bien différent, devraient se traduire l'une et l'autre par: *La lernantoj, kiuj ne laboris, estos punitaj*.

De fait il n'en est rien; tout bon espérantiste dans le premier cas utilisera le corrélatif *tiu* et écrira *Tiuj lernantoj, kiuj ne laboris, estos punitaj*. Dans le second cas il emploiera par exemple un participe adverbial: *Ne laborinte, la lernantoj estos punitaj*. L'usage des corrélatifs, il faut le signaler, est une distinction très utile, qui permet de lever bien des ambiguïtés. Soit la phrase: *J'avais rencontré hier le fils de votre oncle qui est mort hier*. Qui est mort, l'oncle ou son fils? En espéranto on dira suivant la situation: *Hieraŭ mi renkontis la filon de via onklo, kiu hieraŭ mortis* ou bien *Hieraŭ mi renkontis tiun filon de via onklo, kiu hieraŭ mortis*. Vous voyez qu'ici c'est l'espéranto qui paraît l'emporter en précision sur le français.

Que les débutants toutefois se méfient d'une double tentation: dans un premier temps ils ont du mal à rendre certaines nuances du français, ils s'imaginent que l'espéranto est encore une langue imparfaite, et l'on en voit qui, avant même d'avoir terminé un cours du premier degré élaborent des projets de réforme. Dans un deuxième temps, au contraire, maîtrisant mieux les subtilités de la langue, ils pensent volontiers le français incapable de rendre les nuances de l'espéranto. Gardons-nous de tout excès: la langue de Voltaire et de Victor Hugo possède elle aussi toutes les ressources nécessaires, simplement leur apprentissage est plus long et plus difficile: le français réserve à une élite les finesses de la langue, l'espéranto les permet à tous. Il s'agit presque d'un choix de société.



Bernard AUNIS

LE PROBLEME DES PARTICIPES EN ESPERANTO

Certains débutants ont entendu confusément parler d'une querelle qui diviserait le monde espérantiste sur l'emploi des participes: on ne saurait jamais au juste quand employer *ata* ou *ita*, les meilleurs auteurs se contrediraient, d'épais volumes auraient été écrits sur la question et n'auraient fait que l'embrouiller davantage. Je suis heureusement en mesure de rassurer ceux qui s'inquiètent: il existe sur les participes un usage officiel, celui de Zamenhof lui-même, continué après lui par les meilleurs écrivains, lumineusement expliqué dans la *Plena Analiza Gramatiko*, officialisé enfin par l'Académie voici plus de vingt ans. Je ne m'attarderai pas à citer les espérantistes de renom qui l'ont employé: ce serait dresser la liste des meilleurs auteurs de notre littérature. Qu'il me suffise de dire que c'est l'usage de *Faktoj kaj Fantazioj*, ouvrage révisé à la demande de l'Universala Esperanto-Asocio comme livre de lectures de base pour assurer l'unité de la langue.

Simplement, comme nous sommes en démocratie, rien n'interdit à ceux qui ont du temps et de l'argent à perdre d'élaborer des projets de réforme et de chercher à les propager; le système dit *atiste* est l'un d'eux, tout banalement. Son principal défaut est que, non content de supprimer d'utiles nuances, il introduit dans l'espéranto le principe des verbes auxiliaires qui lui est totalement étranger, tout cela dans le but de rendre la langue plus facile pour les locuteurs de langue germanique, quitte à la compliquer pour le reste des gens.

Voyons brièvement de quoi il s'agit: si vous dites *Hodiaŭ mia veturilo estas riparata*, tout le monde comprend que votre voiture est en réparation; tandis que *Hodiaŭ mia veturilo estas riparita* indique qu'elle est déjà réparée, et donc en état de marche. Là-dessus je ne pense pas que beaucoup me contrediront. *Riparita* signifie donc déjà réparée et *riparata* signifie en réparation.


Si donc je dis *Hieraŭ mia veturilo estis riparata*, cela ne peut signifier en bonne logique qu'une seule chose: que ma voiture était hier en réparation. Si je veux indiquer que la réparation a été achevée, il me faut dire *Hieraŭ mia veturilo estis riparita*. Voilà le système officiel, et on ne peut nier qu'il ait le bon sens pour lui.

Or, dans le système *atiste*, contrairement au principe fondamental de l'espéranto suivant lequel un mot conserve toujours la même signification, le sens du participe dépend du verbe qui l'accompagne. Ainsi *Hieraŭ, mia veturilo estis riparata* signifie que hier la réparation a été effectuée. *Riparata* qui signifiait en réparation avec un verbe au présent prend le sens de *déjà réparé* quand le verbe est au passé: le changement de temps du verbe *esti* entraîne le changement de sens du participe *riparata*. Vous n'y comprenez pas grand chose? moi non plus. Mais dans cette affaire le plus amusant est que les partisans de cette doctrine insistent sur sa logique et sa simplicité: ils manient mieux l'humour que la langue.

Ce n'est pas mon habitude de vous ennuyer, chers lecteurs, par des considérations grammaticales; au reste, depuis sa condamnation l'*atisme* disparaît peu à peu. Mais il est possible que dans telle ou telle réunion vous tombiez sur un vieillard qui tâchera de vous transmettre un flambeau dont personne ne veut plus: il est bon que vous sachiez à quoi vous en tenir.



El la redaktorejo: estus bone, se iu partoprenant(in)o al iu esperanto-evento raportus pri ĝi.... Kvankam la staĝo de Merkwiler-Pechelbronn brile sukcesis, neniŭ sendis sian impreson cele publikigon en nia bulteno...



KRUCVORT-ENIGMO

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|----|
| 1 | | | | | | | | | | | |
| 2 | | | | | | | | | | | |
| 3 | | | | | | | | | | | |
| 4 | | | | | | | | | | | |
| 5 | | | | | | | | | | | |
| 6 | | | | | | | | | | | |
| 7 | | | | | | | | | | | |
| 8 | | | | | | | | | | | |
| 9 | | | | | | | | | | | |
| 10 | | | | | | | | | | | |
| 11 | | | | | | | | | | | |

HORIZONTALALE

1 produkti akutan sonon (r) - enmeti en likvaĵon. 2 Danĝera gaso (r) - franca rivero. 3 Ago de tiu, kiu fiksas ion certan - pronomo. 4 Malaltaj arbedoj - paperstrio bindita kunekun libro (r). 5 Aranĝo de substanco etendita sur io (r) - ĝenerale amata de genepoj. 6 Kreskigi rapidecon (r) - jararoj kun propra karaktero. 7 Riĉa nutraĵo (r) - adverbo: distranĉo de vorto. 8 Sovaĝa porko (r) - dazipo - prepozicio. 9 Pufigi kusenon (r) - spirita atmosfero (r). 10 Antikva dio - frukto (r) - prepozicio. 11 Malĝusta opinio aŭ faro (r) - rilata al streĉa interplektaĵo - kurba ostro (r).

VERTIKALE

1 Lojala, fidinda - senutile. 2 Libera alireblejo (r) - salumita fiŝo (r) - metalo (r). 3 Raketaviadilo (r) - nedifinita adjekto - regnestro (r) - angla tiero. 4 Vizitadi (r) - vivmaniero (r). 5 Surprizo pro io stranga. maljuna (r) - fideli al bulteno (r). 6 Sufikso - malamike trakti (r) - iu. 7 Restaĵo (r) - besteto (r) - ido de mamulo (r). 8 Granda rivero (r) - spirita forto - la unua virino. 9 Apartigi - hereda klaso (r) - sufikso. 10 Farata el ĉiuj sanktaj ritoj (r) - konformi sin al io (r) - prepozicio. 11 Plej bona parto - adverbo - numeralo.

"SILAB"-ENIGMO "

Pere de la ĉi-subaj vort-elementoj alfabete ordigitaj, malkovru vortojn, kies simpla difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformos proverbon.

ab al an ĉo duo eo es et et fe in io is it ke ker ko ko lo mo mo mo mor nan nek no no on oso pro ri ro ro ro ro rup se si ste ta ta tu ur ver

| | | |
|----|-----------------|---------------------------|
| 1 | + - - + - - - - | petrola frakcio |
| 2 | + - - + - - | eŭropa lando |
| 3 | + - - + - - | anatomia kanalo |
| 4 | + - - + - - - - | arbo |
| 5 | + - - + - | spirita atmosfero |
| 6 | + - - + - - - | lingva elemento |
| 7 | + - - + - - - | malagrabla subita |
| 8 | + - - + - | brila korpo |
| 9 | + - - + - | besteto |
| 10 | + - - + | literatura ĝenro |
| 11 | + - - + - - - | dia trinkaĵo |
| 12 | + - - + | konstruaĵo |
| 13 | + - - + - - - - | deflankiĝo de seksimpulso |
| 14 | + - - + - - | strutosimola birdo |
| 15 | + - - + - - - | akuza mallaŭdo |
| 16 | + - - + | skriblikvaĵo |
| 17 | + - - + - | fruktograjno |



d'après Télé-Loisirs 3

SOLVOJ DE NIAJ LASTAJ ENIGMOJ (N° 69)

krucvort-enigmo: pistomiksi ero lini ur rikiŝ rap bo ksanti orel ulik aero ad tol it tera inanici don ignor omeno net kaŝu nea oro densa boj lol aŭto

"silab"-enigmo: "ne kvanto sed kvalito decidas pri merito"